oni avide atendas observojn pri la neniiga procedo. Oni eble bezonos multe da tempo por amasigi sufiĉe da faktoj; la tutmonda provizo da anti-protonoj nuntempe estas nur po unu ĉiuhore! Sed nun, ĉar ni certe scias ke ili ekzistas, oni rekomencis kun freŝa konfido la serĉon por ilin trovi en fotografiaj emulsioj; kaj ĉiu unuopa neniiĝo, kiun oni observos en emulsio, montros la postsignojn de ĉiuj ŝargitaj korpuskloj kiuj el ĝi rezultis, kaj tio donos al ni multajn detalajn informojn. Tamen, eĉ malgraŭ tio, estas certe, ke la progreso estos malrapida, kaj ja estas eble, ke la ĉefa progreso okazos en U.S.S.R., kie oni nuntempe konstruas akcelilon kun ĉirkaŭ 10 000 MeV, kiu kredeble baldaŭ kompletiĝos.

Sed la nura fakto, ke la anti-protono ekzistas, estas jam tre grava eltrovaĵo. Tiom en la nuntempa teoria fiziko estas bazita sur la ideo pri simetriaj ŝargoj (la ideo, ke la pozitivaj kaj negativaj ŝargoj ne estas fundamente malsamaj) ke la tuta malesto de la negativaj protonoj estus malfacile klarigebla. Estus necese, forĵeti la rezultojn de multaj jaroj da matematika laborego, se la ideo pri la ŝarga simetrio devus esti forlasata. La forigo de tiu ĝeno permesas pli rapidan progreson laŭ vojo, kiun ni jam konfide kredas la ĝusta vojo.

Mi finu miajn rimarkojn per pli spekulativa noto. Ĉu estas eble, ke en aliaj partoj de la universo la roloj de la pozitiva kaj negativa elektro estas interŝanĝitaj? En tiu okazo ili enhavus „anti-materion", kiu konsistus el anti-protonoj kaj pozitonoj anstataŭ protonoj kaj elektronoj.

Tiu sugesto estas jam antaŭe farita, kaj sendube estos denove farata, ĉar oni ja scias, ke la negativaj protonoj efektive ekzistas. Interne de nia propra galaksio estas sufiĉe ofta interŝanĝo de materialo, tiel ke neniiĝo estus elstare evidenta, se ie troviĝus ia anti-materio. Sed ĉu ne estas eble, ke aliaj galaksioj konsistas el anti-materio? El tie ni ricevas nur lumon; kaj la spektraj linioj el la materio kaj la anti-materio necese estas tute identaj. Do oni ne povas decidi la demandon per la spektroskopio, kiu alie donis al ni tiom da informoj pri la konsisto de la steloj kaj nebulozoj.

Lastatempe oni trovis kelkajn okazojn, ke du galaksioj kolizias, aŭ pli ĝustadire, reciproke interpenetras. Ili eligas multe da energio en la formo de radio-ondoj kaj nekutimaj spektraj linioj, (per tio oni ilin ekrimarkis), sed ili tute ne eligis tiom, kiom ili eligus, se okazus pogranda neniiĝo. Du koliziantaj galaksioj, se ili konsistus el kontraŭa speco de materio, estus elstare evidentaj; ĝis nun oni trovis nenion tian. Fine, oni devas konfesi, ke oni ankoraŭ ne elpensis ian kosmologian modelon, ĉe kiu oni povus prezenti grandajn „insulojn" de anti-materio. Tial estas kredende, ke la universo konsistas ĉie el nia speco de materio, kaj ke la anti-protono estas nur malofta vizitanto, naskiĝinta el fortego, kaj baldaŭ reironta en la neniecon.

LINGVA PREMO KAJ RELIGIAJ MISKONKLUDOJ

far G. HAMMING

1 Lingva premo

Diskutas Jesuo kaj Nikodemo, sub la lunlumo; ili filozofias amike. Kelkajn frazojn ni kaptas (mi rerakontas laŭ Joh. 3 : 3).

Vere, vere, diras Jesuo, nur renaskiĝinto povas vidi la regnon de Dio.

Nu, respondas Nikodemo, kiel naskiĝi povas homo, jam maljuna? Ĉu li povas malnaskiĝigi sin kaj renaskiĝi?

Ni ĉesas aŭskulti; nin trafis la esprimo: malnaskiĝigi sin. Paroliĝis pri la neceso kvazaŭ fandi la personan strukturon por ke ĝi solidiĝu sub pli taŭga formo; temis pri la neceso malligi siajn emojn kaj tendencojn por havigi al si pli sanktajn. „Malnaskiĝigi sin" ili nomas tian evoluŝtupon. La etoso estas amika, la vortuzo eleganta.

Ĉu? Laŭ la originalo Nikodemo demandis: ĉu li povas eniri denove en la ventron de sia patrino kaj naskiĝi?

Kia elefanta frazo! Oni subaŭdas la mokon kaj la malvolon. La patrina ventro tiras la atenton for de la diskuta temo. Kia aĉulo, tiu Nikodemo!

Ĉu? Ja Nikodemo ne povis esprimi sian demandon aliele. Ili ne parolis Esp-e. La elegantan formon „malnaskiĝigi sin" ili ne havis. Nur elefantan banalaĵon povis diri Nikodemo. Jen la sekvo de lingva premo, de mankoj en la lingvo.

Pensante kaj parolante oni devas uzi la lingvajn formojn ekzistantajn. Se taŭga formo mankas, la lingvo instigas al mispenso, al miskonkludo, al misnuanco; la lingvo premdevigas misdirekte. La penso premiĝas en mensan malliberejon. Per kelkaj ekzemploj mi klarigu ĉi tiun tezon. Nur parteton el la abunda materialo mi povas doni.

2 Inter amikoj

S-ro Hakeko kaj S-ro Iĝume renkontas unu la alian. Malnovaj amikoj ili estas.

Ha, kara, diras Hakeko, kiel vi fartas?

Mi dankas, bone, respondiĝas, mi jam estas edzo.

Fine do, kaj vi jam havas gefilojn ĉu?, pluiras la interparolo.

La feliĉa patro Iĝume respondas: jes, unu.

Tio ne eblas, diras Hakeko, vi ne povas havi unu gefilon.

Kial ne, mi ja havas?

Tute simple, la prefikson „ge" oni ne rajtas uzi antaŭ ununombro; „unu gefilo" estas malpermesita esprimo!

Do mi havas neniun, respondas Iĝume.

Neniun kion?

Nu, neniun gefilon!

Sed ankaŭ tio ja ne poviĝas, diras Hakeko, vi ne rajtas uzi „ge" antaŭ ununombra formo.

Kion do mi diru?, malesperas Iĝume.

Tute simple, respondas Hakeko, vi havas neniom da gefiloj.

Nu do, diras Iĝume, mi havas neniom da gefiloj krom unu filon. Kiom preciza kaj facila estas nia lingvo! Sed diru al mi, kiom da gefiloj vi nun havas?

Ankaŭ neniom da ili, respondas Hakeko.

Aĥ, mi kondolencas, antaŭ tri jaroj mi vidis viajn du infanojn karajn. Ĉu ambaŭ mortis?

Ne, diras Hakeko, mi havas neniom da gefiloj krom tri filinojn! Ĉiuj vivas.

Kial do vi diras ne havi gefilojn; vi ja povas uzi la plurnombron?

Pravas vi, respondas Hakeko, tamen pripensu ke la prefikso „ge" montras la kunecon de ambaŭ seksoj; kie estas nur unu sekso, tie mankas la kuneco.

Mi komprenas, diras Iĝume, vi havas neniom da gefiloj krom tri filinojn, — nur pro tio ke nia lingvo estas mirige bela kaj logika. Kiom da simplo kaŝiĝas en ĝi. Nur bedaŭrindas ke la simplo estas kaŝata.

Esence la scienco abstraktas; ĝi konsideras unu trajton aŭ kelkajn, malatentante la ceterajn. Libera scienco rajtas malatenti ĉion ajn laŭbezone. La lingva premo devigas esp-iston atenti la sekson; kvankam multaj jam serĉis liberiĝon. Nur la proponon de S-ro Albault mi menciu (Sc. Rev. **3**, 30).

Ni do konsentu pri jena eblo:

Kat-ino havas unu sekson,

kat-oĉo havas la alian,

ge-kato estas termino por indiki tian beston, se oni volas abstrakti pri la sekso.

Laŭ lingva tradicio kato estas gekato; patro estas patroĉo; infano estas geinfano; knabo estas knaboĉo; homo estas gehomo; viro estas viroĉo; persono estas gepersono; fraŭlo estas fraŭloĉo.

Mi esperas ke venos la tago, kiam radiko sen seksaj sufiksoj senplie abstraktas pri la sekso; ĝis tiam la lingvo tentos nenecese atenti pri la sekso. Fakte tamen mi ne povos decidi pri la lingva evoluo, mi nur povas peti, ke oni akceptu logikan eblon se tiu eblo klarigas la menson.

3 La sekso de Dio

Pri diinoj ni ĉiuj aŭdis, kion do signifas la vorto Dio?, ĉu Dioĉo? Ni citu kelkajn konatajn asertojn:

Fidi Dion ni rajtas, nian ĉielan Patron. La Dia Patro Li estas por ni. Lin ni konas per Jesuo, filo de Dio; „Dia Filo" ni diru. Ĉu katolikon vi aŭdis?; pri la „Dipatrino" li parolis. Dia Patro, Dipatrino kaj Dia Filo, — jen kvazaŭ Dia Familio.

Lingvan premon mi sentas; laŭ mia kredo Dio ne havas sekson. Ne Patroĉo sed Gepatro li estas. Kial mi ne rajtus diri mian kredon per Esp-o? Nek Patroĉo, nek Patrino estas Dio, sed Gepatro. Tion mi kredas kaj tion mi volas diri per mia lingvo. Mia nacia lingvo ne donas la eblojn, klarsentige diri miajn pensojn. Ĝuste tial mi uzas Esp-on.

Dio ne estas kaj oĉo kaj ino, sed nek oĉo nek ino. Multaj kredas ĉi tion; malmultaj povas lerte diri sian kredon pro lingva premo. Ho, kiom ofte oni missentas. Nu, ni rompu la premon!

Ĉu jam sufiĉas, diri jen „oĉ" jen „ge"? Neniel. Ja la pronomoj ankaŭ premas nin. „Ĝi" abstraktas pri la sekso; se mi bone scias, Zamenhof komence volis indiki homojn kaj Dion per „ĝi". La esp-istoj ne akceptis tion; per „ĝi" ili volis indiki nur iun sub plenkreskula rango, ekz. infanon aŭ beston. Nun plenkreskulojn kaj Dion oni indikas per „li". La pronomo „li" indikas jen sekson jen rangon. Lingvan premon tio kaŭzas. Se la esp-istaro postulas pronomon por indiki rangon, ni donu ĝin, sed ni ne misuzu la seksindikan pronomon „li". Mi uzos la formon „gi", la formo memorigas pri „ge" kaj pri „ĝi". *La nova pronomo „gi" povas indiki iun de homa aŭ pli alta rango, abstraktante pri la sekso.* (Kompreneble ĉiu rajtas kaj rajtos ne uzi ĝin).

Nun fine mi rompis la lingvan premon. Ne plu necesas diri pri homo ke *li* estas virino aŭ viroĉo. Pri Dio mi povas diri ke *Gi* estas nia eterna Gepatro.

Ĉu gravas la precizigo? Ni vidu.

Estas konate ke la katolika eklezio multe okupiĝas pri Maria, la „Dipatrino". La reformacianoj tion ĝenerale ne ŝatas. Lingvan premon ili supozas. Teorie la juna eklezio *sciis,* ke Dio estas Gedio; eble oni *sentis* kvazaŭ Dio estas Dioĉo severa kaj postulema. Laŭdire la katolika eklezio sentis bezonon je ĉiela patrino sentoplena, karesema.

Ĉu la aserto ĝustas, juĝi mi ne povas. Ja ne gravas. Se la aserto estas ĝusta, la katolika eklezio missentis sub lingva premo; se la aserto estas malĝusta, la reformacianoj miskritikas sub lingva premo. Nepre la lingva premo kaŭzas misdiskuton, preskaŭ ne ripareblan. Ni ja ne povos juĝi, kiel la katolika dogmaro estus evoluinta se oni ek de la komenco estus dirinta pri Dio ke Gi estas nia eterna Gepatro. Sub lingva premo diskreskas du kristanismoj!

Ĉu mi ne preparas la spicaĵon post la manĝo, pledante por normlingvo post kiam la miskompreno jam donis daŭran rompon? Eble, sed

ni pripensu ke povas veni novaj problemoj kaj devas veni novaj solvoj. Per normlingvo ni serĉu la veron, eĉ se la normlingvo rompas karan tradicion.

Hodiaŭan problemon mi menciu: Laŭ katolika koncepto la eklezio estas patrino por la kredantoj. Ĉu la seksindiko havas valoron? Laŭ mi la eklezio estas senseksa; ĝi iusence povas esti gepatro, ne patrino. Nun legu jenajn du asertojn:

a Dio estas nia Patroĉo, la eklezio nia patrino;
b Dio estas nia Gepatro, la eklezio estas nia gepatro.

Aserto *a* povas supozigi ke nek Dio nek la eklezio estas kompleta, ke ĉe ambaŭ mankas kelkaj kvalitoj, ke ili kune formas gepatran paron. Aserto *b* supozigas ke Dio kaj eklezio konkurencas.

La reformacianoj malatentas la seksindikojn, ili do emas interpreti la katolikismon laŭ aserto *b*; laŭ ili la katolika eklezio konkurencas Dion. Sed la katolikoj atentegas la seksindikojn, parolante pri la eklezio kaj Maria; verŝajne ili sentas laŭ aserto *a*.

Ĉu ni konstatu tion kaj pluiru? Rimedon por interkompreno la esp-istoj volas doni. Ĉe ĉi tiu problemo la esp-istoj donu rimedon por klare scii kaj senti ke nek Dio nek la eklezio havas sekson. *Senti* tion ni devas per normlingvo. Ja la konkludoj dependas de la sentoj, kiujn la lingvo donas al ni!

4 Spirito

Imagu beston buĉatan. Distranĉas oni la varman karnon; jen kaj jen vaporeto videblas. Nun spiras ne la nazo sed la tuta korpo; la spir-ito forflugas, la spirito. Ho, mi ne ludas per esp-aj vortoj; malnovan koncepton mi vidigas. Malnovaj lingvoj apenaŭ distingas inter spiro, vento, aero, persono, spirito, sprito, animo, opinio, tendenco, menso kaj aliaj nocioj. Ja ĉiuj tiuj vortoj indikas ion malmaterian. Laŭ modernulo la vento estas moviĝanta gaso, moviĝanta materio. Niaj prauloj ne povis likvigi gason; laŭ ili la vento estis malmaterio, energio aŭ io tia. Ankaŭ la fantomoj, la ombreculoj, estis malmateriaj.

Ĉiuj facile povis konstati, ke homo ne plu povas pensi, kiam gi ne plu povas spiri; kun la spiro forflugas la mensaj kapabloj. La spiro estas la spirito, ĝi estas la homa esenco loĝanta en la korpo. Pri detaloj mi ne insistu; tiuj ja estas larĝe haveblaj ĉe fakuloj.

Sufiĉu ke „spirito" estas la homa esenco, kiu kvazaŭ loĝas en la homa korpo. Ĉi tiu esenco estis la homo mem, la persono; esenculo ni nomu ĝin.

Do laŭ malnova koncepto loĝas esenculo en la homa korpo; dum sonĝoj ĝi povas iri el la korpo kaj vojaĝi; ĉe la morto ĝi iras el la korpo; post la morto ĝi povas reveni kiel fantomo. Kiel ombro ĝi havas la formon de la korpo; *ombreculo* estas la fantomo.

Kio estas la esenco de frandaĵo, ĉu la pezo? Ne, la gusto. Kio estas la esenco de homo, ĉu la korpa formo? Ne, la idealoj, la kapabloj, la tendencoj, la karaktero, la stilo. Kio do estas la spirito de la homo? PV diras: propra karaktero, karakteriza tendencaro; PV donas la frazan ekzemplon: eduki siajn infanojn en pacema kaj tuthomara spirito.

Se spirito estas tendencaro, ĝi ne estas esenculo; aro ja ne estas ulo. Evidente la vorto spirito nun havas du malsamajn signifojn: jen ĝi estas esenculo, senkorpulo; jen ĝi estas stilo, tendencaro, la koloro kaj parfumo de la homa konduto, ĝi estas *mentalo* (ĉi tiu vorto ne troviĝas en PV, 2a eld.; kredeble la signifo nun estas klara).

Pri detaloj mi ne volas insisti; klare ni vidu ke el unu praa nocio evoluis kelkaj, inter kiuj gravas: *esenculo* kaj *mentalo*.

Konsentu ni, ke esenculo kaj mentalo estas du nepre malsamaj nocioj. Ne sciante la historion ni ne kaptus la ideon, indiki ambaŭ per la sama vorto „spirito".

Ĝenerale konata estas la esprimo: La Patro, la Filo, la Sankta Spirito. Kion la esprimo precize signifas? Ni elektu el du interpretoj:

a La Patro, la Filo, la Sankta Esenculo;
b La Patro, la Filo, La Sankta Mentalo.

Dum la unuaj jarcentoj la eklezio ne povis elekti pro lingva premo; ja ne sciiĝis ke mentalo kaj esenculo estas du malsamaj nocioj. Ĉu la malfacilo gravas? Nepre!

Pri Triunuo povas paroli nur tiu, kiu elektas la interpreton *a*. Mentalo ja ne estas persono. Verŝajne Triunuo estas la plej ŝatata vorto por multaj kristanoj; ĝi eble estas la plej malŝatata vorto por la islamanoj. Malklara vorto dispremis kaj dispremas du religiojn; ĝi ankaŭ pecigas la kristanan eklezion.

En la kristanismo estas du tendencoj: la liberkredaj kristanoj komprenas la vorton per „mentalo"; tradiciemaj kristanoj komprenas ĝin per „esenculo". Ĉi tiuj du kristanismoj diskreskas sub lingva premo. Apenaŭ ni povas malhelpi la disiron.

La biblia lingvo ne estas ĝisfunde klara; ĝi ne estas normlingvo. En normlingvo la plursenca vorto „spirito" mankas. Nepre ni devas konstati, ke la biblio ne estas laŭeble bona vortigo de la vero. La praktiko pruvis, ke ĝi estas daŭra fonto de diskredo. Interfratiĝon ĉiuhoman ni trovos nur, se ni diras la esencan veron per normlingvo. Per tiu metodo ni povas serĉi komprenon inter ĉiuj mondaj ismoj.

5 Filo, biologia nocio

La homa korpo konsistas el ĉeloj; ĉeloj enhavas kernon, kiu konsistas

el ĥromosomoj. La ĥromosomoj kondiĉas la heredajn ecojn; ne nur la korpan formon sed ankaŭ la mensajn kapablojn. Klare difini filon ni povas: *A estas gefilo de B, B estas gepatro de A, se duono el la ĥromosomoj de A originas el la korpo de B.* Pri detaloj ni abstraktu.

En klara normlingvo ni ne donu duan signifon al la vorto filo. Parolante per ĉi tia klara normlingvo, ĉiuj kristanoj konsentos ke Jesuo ne estas filo de Dio; ja neniu kristano opinias ke Dio havas korpon kun ĥromosomoj. Eble ekzistis speciala rilato inter Dio kaj Jesuo; eble tiu rilato postulas sian terminon; — tia postulo ne povas implici ke ni konfuzumu per plursencaj vortoj.

Ĉu gravas insisti pri ĉi tiu termino? Ja estas internacia tradicio uzi por ĉi tiu celo ĝuste tiun vorton, per kiu oni ankaŭ indikas la familian nocion filo. Daŭrigante la kutimon ni povas fari Esp-on laŭeble internacia. Konsentite; sed tia internacia lingvo daŭrigos la internaciajn kverelojn kaj malkonkordojn. Jam en la korano la islamo konstatas ke „Dio nek naskis nek naskiĝis". „Naski" estas biologia nocio; la islamo rifuzas uzi biologiajn nociojn por indiki la rilaton inter Jesuo kaj Dio; ĝi malŝategas la kristanan vortuzon. La disiron de islamo kaj kristanismo la lingva premo forte influis, eble kaŭzis.

Ĉu ni riproĉu pro la mallerta vortuzo? Ne; ja la scienca difino de „gefilo" baziĝas sur laboro dum la lastaj cent, ducent jaroj. Ĝis 1800 oni nepre ne povis precizigi la esprimojn; riproĉindaj estas la nunuloj, kiuj ne volas rompi karajn tradiciojn kaj preferas daŭran malfratecon.

Interkompreno kaj interfratiĝo venos nur se ĉiu purigas sian propran menson per normlingvo.

6 „Ben", centra biblia termino

Nia lingvo posedas kelkajn vortojn por indiki homon: *homo, persono, individuo.* Rimarkante tion oni povas mire demandi kial Esp-o akceptis la tri vortojn; unu ja eble sufiĉus. La respondo povas esti ke ĉiu vorto havas sian propran nuancon. Laŭ P.V. „individuo" ankaŭ povas esti besto aŭ vegetaĵo; ĉefe gravas ke troviĝas klara limo ĉirkaŭ la estaĵo, — aŭdante la vorton individuo ni klare konscias pri aparteco, distingeblo.

La vorto persono ne povas indiki iun ajn estaĵon; ĝi indikas homon. Des pli forte venas la demando kial ni uzu la vorton persono krom la vorton homo. Nu, la vorto persono atentigas pri tio ke la homo havas siajn proprajn kvalitojn, kiuj faras el gi specialan unuon, ne komplete analizeblan. Persono estas centro de juĝo, de konscio, de volo, de ago. Laŭ P.V. persono estas homa individuo konsiderata kiel konscia, responduma kaj havanta devojn kaj rajtojn. Do uzante la vorton persono ni atentigas pri tio, ke la homo havas propran individuecon, propran karakteron; „persono" estas homo kiu karakterizas sin mem.

Neniu homo karakterizas sin mem komplete; juĝante gi parte juĝas laŭ tradiciaj normoj, agante gi obeas la volon de la medio; sur la homon influas ĉiaj homoj, ĉiaj cirkonstancoj. Tion ni indikas per aliu vorto. Afablulon karakterizas afablo, grandegulon karakterizas grandego, stratulon la strato, unubrakulon la unusola brako, mensogulon la mensogado. Ankaŭ per „-ulo" ni povas indiki homon, la indiko petas pluajn informojn. Ni uzas la formon *-ulo* por atentigi pri indikebla karakterizaĵo. Do estas kontrasto inter „persono" kaj „-ulo". Homo nomiĝas persono pro sia propra, speciala, neanalizebla unueco; gi nomiĝas -ulo ĉar trajtoj el la formo, la karaktero kaj la konduto estas analizeblaj kaj indikeblaj.

Volonte mi skribus „ulo" anstataŭ „-ulo"; pro la lingva tradicio mi ne povas fari tion. La memstara vorto „ulo" ricevis malŝatan signifon. Por kompreni tion ni vidu ke laŭ la supra analizo *ulo* iel estas *malpersono;* ni povas diri ke persono karakterizas sin mem, malpersonon karakterizas io aŭ iu alia. Personon ni povas koni, ĉar gi havas karakteron; malpersonon koni ni ne povas se ni ne scias la fremdan karakterizaĵon. Pri malpersono ni povas dubadi kaj malcerti; tio ofte kaŭzas malsimpation. Fakte tamen la malsimpatio kaj la dubado estas niaj reagoj al la ulo, ili ne estas esencaj trajtoj de la malpersono mem. Cetere ĉiu malŝato estas trajto pli de la malŝatanto ol de la malŝatato!

Do la tradicio venis ke *ulo* estas malŝata vorto. La esprimoj „afablulo" kaj „afabla ulo" havas malsamajn signifojn. Afablulo estas homo kies esenco estas afablo; de afabla ulo ni malkonas la esencon, ni scias nur ke gi estas afabla. Por eviti miskomprenon mi uzos la memstaran vorton „-ulo" kaj difinas ke „-ulo afabla" estas „afablulo". Pli elegantan solvon serĉi ne necesas, ĉar mi uzos la terminon nur kelkajn fojojn.

La ŝemida kulturo posedas nocion, kiun oni indikas arabe per „ibn", hebree per „ben". Tiun nocion oni tradukadas per „filo"; ĝia signifo pli malpli estas „-ulo" laŭ la klarigo kiun mi ĵus donis. Ekzemplon mi povas ĉerpi el la revuo „Esperanto" (jaro 1952 p. 115; mi aldonis laŭvorton tradukon per „ul"):

araba vorto	laŭvorta traduko	signifo
ibn ad-dunya	*filo de la mondo; mondulo*	*riĉulo*
ibn al-layl	*filo de la nokto; noktulo*	*rabisto*
ibn al-ayyam	*filo de la tagoj; tagulo*	*spertulo*
ibn ĥurr	*filo libera; libereculo*	*honorulo*
ibn awadim	*filo de bonedukitoj; bonedukitulo*	*bonmorulo*
ibn ĥarb	*filo de la lukto; luktulo*	*militisto*

Vi vidas ke la nocion „ibn" ni tradukas pli taŭge per „-ulo" ol per „filo".

Ofte oni povas traduki la vorton per „ano"; „filo de Cion" estas Cionano, aŭ se vi volas: Cionulo. La ekzemplo vidigas ke „ulo" kaj „ano" povas esti pli-malpli samsignifaj. Sed estas diferenco. Se kamparano ekloĝas en urbo gi tuj estas urbano; laŭ sia konduto kaj mentalo gi povas resti kamparulo; kamparulon karakterizas la kampara civilizo, eĉ se gi loĝas en urbo. Ĉar la signifo de „-ulo" estas malpli preciza ol la signifo de „ano", oni pli ofte povas uzi la unuan vorton. Se uzeblas ambaŭ sufiksoj, oni preferas la pli klaran; do la malpreciza povas tendenci indiki la ceterajn signifojn. Ĉar en la vorto „kamparano" la sufikso klare indikas la loĝlokon, la sufikso en „kamparulo" taŭgas por speciale indiki la ceterajn trajtojn, ekz. la kulturajn. Sed tiu speciala indiko devas evidentiĝi el la kunteksto.

Same kiel „-ulo" havas pli vastan signifon ol „ano", tiel la hebrea „ben" havas pli vastan signifon ol nia „filo". Ni baldaŭ vidos la malbonajn sekvojn.

Por precize kapti la signifon de la hebrea „ben" ni studu nian propran finaĵon -ido. Kutime oni estas gentido pro korpa parenceco; pro ĉi tiu parenceco oni akceptas la gentajn morojn. Jen kaj jen iu malakceptas tiujn morojn kaj formigras; li edziĝas al fremdulino, liaj filoj ne estas gentidoj. Sed se la sama edzoparo loĝus inter la samgentanoj la gefiloj nepre estus gentidoj. Decide estas, ĉu la gefiloj vivas en la genta civilizo, ĉu tiu civilizo karakterizas ilin. Apenaŭ eblas ke la genta kulturo ne influas sur la gentanojn, kiuj loĝas en la genta tuto. Preskaŭ ĉiuj kiuj estas gentidoj laŭ biologia vidpunkto, ankaŭ laŭ kultura vidpunkto estas gentidoj. Kompreneble, oni ja malfacile forlasas la tutan genton.

Unuavide do, oni pensas ke „ido" indikas biologian rilaton; sed plua esploro dubigas pri tio. Tamen nur malfacile ni povas distingi ĉu „ido" estas biologia nocio aŭ civiliza. Preciza analizo montras al ni ke oni povas forlasi la genton tiel, ke oni ne plu estas gentido; aliulo povas eniri la genton kaj fariĝi gentido pro propra elekto; finfine la civiliza kriterio estas la pli grava.

Hazarde ni bone povas studi la signifon de la hebrea „ben", daŭrigante la studon pri nia vorto „ido". Unuavide ŝajnas ke „ido" havas du signifojn: bestido estas *juna* besto, ŝemido povas esti plenkreska postnepo de Ŝem. P.V. serĉas unuecon en la difino dirante ke la sufikso esprimas ĝeneralan ideon de naskiteco. La solvo ne estas plene kontentiga, ĉar naskiĝis ne nur bestido sed ĉiu besto. Ni devas klarigi kial homido povas esti plenkreska dum bestido devas esti juna. Ŝajnas al mi ke la centra ideo estas ke *ido dependas pro korpa deveno*. Juna besto estas bestido ĝis ĝi ne plu dependas de la patrino; postnepo de Ŝem estas ŝemido se gi sufiĉe dependas de la Ŝema gento per la gentaj moroj kaj vivkondiĉoj. Do kutime la gentido dependas de la prapatra gento laŭ (1) deveno, (2) loĝloko kaj vivkondiĉoj, kaj (3) laŭ moroj kaj civilizo.

Ĉar nia nocio „ido" fakte kunigas tri kriteriojn, ĝi tre similas al la hebrea „ben", al la araba „ibn". Iom bonvole ni povus traduki *ibn al-layl* per *ido de la nokto;* la rabisto dependas, venas kaj kvazaŭ devenas de la nokta mallumo.

Ne nur ĉe la gentoj sed ankaŭ en la modernaj ŝtatoj oni ne forlasas tre pogrande sian hejmlandon kaj nacian kulturon. La familion, la patran domon oni pli facile forlasas. Ni modernuloj, facile imagas, ke gefilo havas aliajn opiniojn kaj alian kulturnivelon ol gia patro. Tion la hebreoj malfacile povis imagi; ilia „ben" signifis ne nur „ido de gento" sed ankaŭ „filo", pli ĝuste: „ido de unuopa familio". Ĉe ili la filoj ankoraŭ kutimis resti loĝloke, more kaj civilize je la patro. Pro la socia strukturo la vorto „ben" havis biologian kaj kulturan signifon.

Krome estis tre forta kaŭzo por ne distingi inter la biologia kaj la kultura vidpunktoj. Antaŭ kelkcent jaroj nenion oni komprenis pri gravedigo; la spermeroj ne jam estis konataj. Sed ideojn oni havis, kompreneble. Ne ridu pri la supozo ke la patrino donas la korpon kaj la patroĉo la spiriton. Ankoraŭ nun la edzino eniras la familion de la edzoĉo, prenante ties familian nomon; iam ŝi prenis la familian mentalon. Tiel ankaŭ la infanoj havos la mentalon de la patroĉa familio. La biologia teorio klarigis kulturajn rilatojn; la jura sistemo substrekis tion.

La ideo ke oni povas gravedigi virinon, metante en ŝin spiriton, estas trovebla en la libro de la kuracisto Luko (1 : 35): „La Sankta Spirito venos sur vin (Maria), kaj la potenco de la Plejaltulo superombros vin". Grava diferenco inter filo kaj -ulo ne povas esti, se la spirito de la patroĉo estigas la filon kaj karakterizas la -ulon. Laŭ la koncepto de la ŝemida kulturo oni *devis* esti filo volante esti -ulo; laŭ la sama koncepto la filo *devis* esti -ulo, aliukaze li estus misfilo.

Laŭ hodiaŭaj opinioj oni heredas korpajn kaj mensajn trajtojn per la hromosomoj el la gepatroj; la mentalon, la koloron de la konduto, oni „heredas" per sociaj kontaktoj, — ofte „heredigas" la gepatroj, ofte la amikoj, kelkfoje oni trovas sian propran mentalon.

Laŭ la ŝemidoj la infanoj heredas la mentalon de la patroĉo, ĉar ties spirito estigis ilin. Mi konsentas ke mi tro science vortigis ideetojn kiuj konscie-malkonscie vivetis ĉe la koncernuloj. Gravas ke la ŝemidoj ne vidis limon inter la nocioj „filo" kaj „-ulo"; la hebrea vorto „ben" indikas *unu* nocion, de kiu la signifoj „filo" kaj „-ulo" estas du nuancoj.

Mi multe cerbumis por trovi taŭgan esprimon per kiu kapti la kernon de la hebrea nocio. La plej taŭga ŝajnas esti „fil-umo"; sed „filumo" ne taŭgas ĉar la ebla mislego „fi-lumo" estus tro ĝena por miaj specialaj celoj. Mi ankaŭ konsideris transpreni unu el la ŝemidaj radikformoj; la

hebrea „ben" kaj la aramea „bar" ne estas uzeblaj, ili jam estas esp-aj radikoj. Mi povus uzi la araban formon „ibn". Finfine mi decidis ne fari tion. Speciale S-ro M a k k i n k avertis ke oni ne faru novajn esp-ajn terminojn por indiki malklarajn nociojn. Fakte do mi uzos la terminon „ibno" por indiki unu el tiuj signifoj de „ben", kiujn mi ne povas traduki per nia „filo". Tiel „filo" restas biologia nocio. kaj „ibno" estos morala, kultura, religia nocio. La tutan ŝemidan nocion mi indikos per „ben".

Mi preferis uzi la formon „fil-umo", sed tiu formo ne taŭgas. Por analogie larĝigi la signifon de „patro" mi nepre povas uzi „patrumo", per tiu formo mi do indikos la koncernan hebrean nocion.

7 Johano, la Baptisto

Jen, en la ŝemida civilizo estas nova persono. Johano diskutas kun la judoj. Aŭdu kion li diras (Mt. 3 : 9; mi citas laŭsence): Ne misimagu ke vi rajtas diri: „Ni havas Abrahamon kiel patrumon", ĉar mi diras al vi ke Dio povas el ĉi tiuj ŝtonoj starigi idojn al Abraham.

Kiom da saĝo kaŝiĝas en ĉi tiu frazo! Ni klopodu malkaŝi la kaŝaĵon.

Kion fakte opiniis ĉi tiuj judoj? Ili certis esti la elektita popolo, heredadanta la sanktajn promesojn far Dio al Abraham. Kiel Abrahamidoj ili pretendis esti speciala adreso por la Dia favoro.

Kontraŭ tio la Baptisto asertas: vi estas postnepoj de Abraham sed ne Abrahamanoj; nur Abrahamanojn Dio favoras, ne vin. Kiel tion diras Johano? Per la diro ke Dio povas krei idojn, „ben"ojn al Abraham el ŝtonoj.

El ŝtonoj krei filojn al Abraham aŭ ties gento, Dio ne povas. Gi devus falsi la historion, deklarante ke la hromosomoj de la novkreitoj originas el la korpoj de la Abrahamidoj! „Ben"ojn povas krei Dio; per sia aserto Johano diras ke „ben" estas misvorto; oni klare distingu inter „filo, postnepo" kaj „ano". Abrahamano estas adepto de Abraham gi akceptas Abrahamon kiel moralan kaj religian gvidanton. Abrahamon adheri oni povas eĉ se oni ne estas postnepo lia; la postnepoj de Abraham ofte ne iras lian vojon. Johano faris el unu nocio du novajn.

Sed li indikis ambaŭ nociojn per la sama malnova vorto. Tio kompreneble kaŭzis lingvan premon kaj miskomprenon. Por bone analizi ni indiku la du nociojn per du malsamaj vortoj. Unu vorto estu „filo", la alia estu „ibno". Per „ibno" ni do povos traduki la *johanan* vorton, se „filo" ne estas taŭga traduko. Ĉe Johano la Baptisto „ibno" indikas moralan kaj religian dependecon, ne korpan. Analogie ni donos al „patrumo" moralan kaj religian akcenton.

Pli science ni do povas vortigi la aserton de Johano tiel: Vi, judoj, opinias ke „ido" indikas *unu* nocion, ke postnepo de Abraham aŭtomate

estas abrahamano. Tamen „ido" indikas du malsamajn nociojn; la nocioj „postnepo" kaj „ibno" ne implicas unu la alian. Vi, judoj, korpe estas abrahamidoj, sed la Dia favoro iras al la ibnoj de Abraham, al la abrahamanoj, kiujn karakterizas la abrahama mentalo. Nu, abrahamanojn Dio povas krei el ŝtonoj, ĉar ja la mentalo ne herediĝas laŭ korpaj vojoj.

Mallonge do Johano diris: Ne gravas ĉu vi estas *filoj* de Abraham, vi devas esti liaj *ibnoj*.

Baptis Johano. Se izraelido manĝis porkaĵon, gi fariĝis „malpura". Same multaj aliaj okazoj gin faris „malpura". Por repuriĝi gi devis lavi sin; tiel gi devis lavi sian „malpuran" ilaron. La lavo ne sufiĉis, ofte oni restis „malpura ĝis la vespero". „Malpuro" estis rita nocio, ne higiena. Tiun ritan lavadon la Nova Testamento indikas per la radiko „bapt".

La judoj ofte akceptis konvertitojn en la gentan tuton. Tiujn „alvenulojn" ili cirkumcidis sed ankaŭ baptis; ili ja estis el la „malpuraj" gentoj. Tiu bapto estis „bapto de aliĝo". La „alvenulo" nun povis sperti la Dian favoron; gi ricevis pekliberiĝon, plenumante la leĝon mosean.

Predikis Johano „bapton de mentalŝanĝo por la pardoniĝo de pekoj". Ne „bapton de aliĝo" sed „bapton de aliiĝo" Johano predikis (Mk. 1 : 4). Ne adopta postnepo de Abraham oni estu, sed ano de Abraham; novan mentalon oni havu. Mentalŝanĝo donas pekliberiĝon, ne gentoŝanĝo. Judojn baptis Johano, implice neante ke ili formas jam „puran" popolon de Dio.

„Ne aliĝo sed aliiĝo", „ne postnepo sed ano", tiel Johano la Baptisto starigis la centran problemon de la Nova Testamento. Jesuon li baptis; ili estis samideanoj.

8 „Ben" de David

Eble niaj infanoj havos alian profesion ol ni. Ni ne atendas pluvivi per iliaj korpoj kaj laboroj. Ĉu vere? Ankoraŭ nun estas multaj familioj, kiuj havas familian entreprenon, ĉu fabrikon, ĉu metion, ĉu bienon; familiajn sekretojn ili havas aŭ familiajn lertojn. En tiaj familioj la filoj fariĝas „ben"oj; la korpa deveno implicas daŭrigon de la familia tradicio.

Nepre hereda estas la profesio de reĝo; libere elekti profesion reĝido ne rajtas. Laŭ rigida sistemo unu el la reĝidoj fariĝas reĝo. Ĉi tiu reĝido nepre estas „ben". Gin karakterizas la historio de patro kaj prapatro, de la tuta regno. La reĝa „ben" daŭrigu la patran kaj prapatran laboron; gi plenumu la idealojn el la regnaj praepokoj.

La izraelidan regnon fakte fondis David; ĝis li la ŝtato ne trovis fortan unuecon, post li la ŝtato perdis ĝin. Ne mirigas ke la popolo revis pri reveno de la davida glorepoko; ne mirigas ke la profetoj promesis tion

sub la kondiĉo ke oni reobeu la ordonojn de Dio; Dio donos sian Sanktoleiton (greklingve: Kriston), „ben"on de David; li naskiĝos en la davida urbo Betlehem kaj restarigos la davidan regnon, forpelos la malamikojn.

Aŭdu la demandon de Jesuo (Mk 12 : 35; mi citas laŭsence):

Kial diras la skribistoj, ke la Sanktoleito estas „ben" de David? David mem diris per la Sankta Spirito: „La Eternulo diris al mia Sinjoro: Sidu dekstre de Mi, ĝis mi faros viajn malamikojn benketo por viaj piedoj". David mem nomas lin Sinjoro; kaj kiel do li estas lia „ben"?

Novan koncepton pri „ben" Johano donis al Jesuo. Nun Jesuo trapensas la problemon, kiu karakterizu la Sanktoleiton, ĉu David, ĉu Dio. „Ne David", li konkludis. Davidano ne povas esti „Sinjoro" de David, kaj David atendis „Sinjoron".

Bone vidu la konflikton: la skribistoj atendis ke la Sanktoleito estos „ben" de David, filo kaj ibno; kontraŭ tio Jesuo pretendas ke la Kristo ne daŭrigos la davidan laboron sed havos propran taskon, kiu superas la laboron de David.

Jesuo ne volis esti ibno de David; li predikis al surduloj, liaj disĉiploj ne komprenis lin. En la biblio estas du malsamaj familiaj tabeloj, kiuj pruvu ke Jesuo estas „ben" de David, filo kaj do ibno; en la biblio estas du malsamaj rakontoj, kiuj pruvu ke Jesuo la Nazaretano naskiĝis en Betlehem, la davida urbo. Laŭ Mateo loĝis Jozef kaj Maria en Betlehem, post la naskiĝo ili fuĝis al Nazaret; laŭ Luko ili jam loĝis en Nazaret kaj mallongan tempon vojaĝis al Betlehem. Sen ia timo antaŭ la heroda familio ili iris al la templo ktp. La du rakontoj forte konfliktas! Kune ili diras ke la disĉiploj nepre volis kredi ke Jesuo estas la promesita davidido; kiel ajn.

Ĝis la hodiaŭo la kristana eklezio klopodegas kredi ke Jesuo estas postnepo de David; laŭ Jesuo mem gravas nur ke tio ne gravas. La kristana eklezio ne komprenis Jesuon ĝis la hodiaŭo pro lingva premo.

La diferencon inter „filo" kaj „ibno" komprenis kredeble nur du personoj: Jesuo kaj Johano la Baptisto. Kaj ĉi tiuj du personoj ambaŭ nociojn indikadis per unu termino, kiun mi citas kiel „ben". Ĉu ni riproĉu pro tia fuŝa vortuzo?

Sekson Dio ne havas. Ĝis nun la lingvoj devigis nin indiki Gian sekson. Por eviti tion mi uzas la sufikson „oĉ" (kiun faris A l b a u l t) kaj la pronomon „gi". Ĉu estas kredeble, ke la esperantistoj uzos ilin dum la morgaŭaj kvin jaroj? Neniel! La vortetoj ja rompus la lingvan tradicion.

Lingvo estas socia fenomeno; unuopulo ne povas fari klaran terminon se la samlingvanoj ne akceptas ĝin. La lingva premo ne permesis al Jesuo klare vortigi siajn pensojn kaj sentojn. Li restis soleculo inter siaj amikoj; ĝis la lingva premo premis lin morta.

9 „Ben" de Dio

Johano baptis en la dezerto; li predikis ke „ibno" estas alia nocio krom „postnepo", „filo"; lian predikon Jesuo akceptis.

Kies ibno estos la Sanktoleito; kies idealojn li plenumu? Ne la idealojn de David, ne la idealojn de la juda patrujo, sed la idealojn de Dio. La Dian normaron predikis la profetoj; la Dian normaron la Kristo devas vivi. Dio estu la „Patrumo" (vidu sekc. 6) de la Sanktoleito, kaj karakterizu lin. Sed tio ja ne eblas; „„ben" de Dio" samtempe signifas „filo de Dio", „Diido". Ĉi tiuj vortoj estas blasfemaj. Jesuo *devas* uzi la vortojn ĉar aliujn li ne havas; Jesuo *ne povas* uzi la vortojn, ili ja ne diras al la aŭdantoj tion kion Jesuo volas esprimi. Kion fari?

Ho, mi scias ke Jesuo ne pensis per ĉi tiuj modernaj analizoj; mi ne povas vortigi la konflikton tiel kiel Jesuo sentis ĝin. Eble la plej granda diferenco estas ke miaj frazoj estas *pensoj* pri problemo kiun Jesuo *sentis*. Jesuo sentis animan konflikton kiu eblis en tiu epoko en tiu medio. Ni divenas la konflikton per scienca analizo de lingva premo. Ni devas streĉi la animon por senti la problemon pri kiu ni pensis; en sia diskuto Jesuo klopodis pensi pri problemo kiun li sentis. Ĉi tiun distancon inter la moderna scienca sinteno kaj la atmosfero ĉirkaŭ Jesuo ni ne forgesu, se ni volas kompreni la dramecon de ĉi tiu historio.

Problemon sentis Jesuo, kaj li spertis ke Dio donas la solvon. Ne gravas ĉu la sperto estis fakto aŭ vizio; por Jesuo ĝi estis realaĵo. Aŭdu:

Okazis post la bapto (Lk 3 : 22) ke „la ĉielo malfermiĝis, kaj la Sankta Spirito malsupreniris sur lin en korpa aspekto kiel kolombo; kaj venis voĉo el la ĉielo: Vi estas Mia „Ben", la amata; en vi Mi havas plezuron". Jesuo spertis ke Dio mem solvis la problemon; tamen la okazo donis nur personan solvon. Ja estas du interpretoj de la vortoj.

Mi kredas ke Jesuo esp-igus la vortojn tiele: La Sankta Mentalo malsupreniris sur lin en korpa aspekto kiel kolombo; kaj venis voĉo el la ĉielo: Vi estas Mia Ibno, la amata; en vi Mi havas plezuron.

Sed la judoj komprenis jene: La Sankta Esenculo malsupreniris sur lin en korpa aspekto kiel kolombo; kaj venis voĉo el la ĉielo: Vi estas mia Filo, la amata; en vi Mi havas plezuron. Eble la disĉiploj de Jesuo komprenis same.

Malkonkordis Jesuo kaj la judoj. Kontakti per lertaj terminoj ili ne povis; ja tiuj terminoj mankis. Unu klopodo komprenigi sin troviĝas ĉe Johano (5: 18, 19). Ni legas ke la judoj klopodis mortigi Jesuon, ĉar li nomis Dion sia propra Patrumo, kaj do pretendis esti egala al Dio. Jesuo responde diris al ili: Vere, vere, mi diras al vi: La Ibno ne povas per si mem fari ion, krom tion, kion li vidas la Patrumon faranta; ĉar kion ajn Gi faras, tion la Ibno tiel same ankaŭ faras.

Jesuo nepre neas samrangecon. Kiel bildo povas imiti kaj simili homon, sed ne egali gin, tiel Jesuo imitas kaj similas Dion sed ne egalas Gin. Tion diri Jesuo volis, sed li apenaŭ sukcesis; li ja ne povis uzi normlingvon, mankis al li taŭgaj lingvaj rimedoj. Fakte li ne uzis la unusencan „ibno" sed la dusencan „ben". Alian rimedon li ne havis.

Rezulte la eklezia tradicio ĝis nun pensigas pri Sankta Esenculo, pri Filo de Dio, pri kvazaŭpatruja eklezio. La eklezio kristana elektis la interpreton, kiun Jesuo nepre maladheris. Tiu elekto far la eklezio kaŭzis ke la islamanoj nomas la kristanojn aldonemuloj; laŭ ili la kristanoj aldonas Iun samrangan al Dio unusola.

Evidente Jesuo ne estis aldonemulo. La rompon inter islamo kaj kristanismo forte influis la fakto, ke la kristanoj ne sekvis Jesuon. Ĉion ĉi kaŭzis la lingva premo.

10 La kondamno

Laŭ Mateo (26 : 63) la ĉefpastro diris al Jesuo: „Mi ĵurligas vin per Dio la vivanta, ke vi diru al ni, ĉu vi estas la Kristo, la „ben" de Dio. Jesuo diris al li: Vi diris; tamen mi diras al vi: Poste vi vidos la „ben"on de la homo, sidantan ĉe la dekstra mano de la Potenco, kaj venantan sur la nuboj de la ĉielo.

Tiam la ĉefpastro disŝiris siajn vestojn, dirante: Li blasfemis; por kio ni plu bezonas atestantojn, ... Kaj oni kondamnis lin al morto.

Bonvolu atenti ke oni mortigas Jesuon pro la vorto „ben", plena je lingva premo. Al la ĉefpastro Jesuo konsentas ke li estas „ben" de Dio, per la jesa esprimo „vi diris". Sed Jesuo ne konsentis senplue. Per la sekvanta vorto „tamen" li malfortigas la konsenton. Ja la konsento koncernas nur la formon de la demando, ne la enhavon.

La ĉefpastro demandis ĉu Jesuo estas filo de Dio, Dia Esenculo en homa korpo; Jesuo konsentas ke li estas ibno de Dio, homfilo karakterizata far la Dia mentalo.

Taŭgajn vortojn por klarigi la diferencon inter demando kaj respondo, Jesuo ne uzis; ili ne estis disponeblaj. Ne insistis Jesuo pri la termino, li mem uzis „„ben" de la homo"; li indikis ke Dio *donos* al li la venkon (tion li diris per la ne plu kompreneblaj esprimoj „dekstra mano de la Potenco" kaj „veni sur la nuboj"). Jesuo substrekis malsaman rangon. Ne insistis Jesuo pri la termino „„ben" de Dio"; sed malkonfesi ĝin li ne povis; Dio mem ja aprobis ĝin ĉe la baptiĝo.

Sufiĉu ke apenaŭ estis rilato inter la ĉefpastra demando kaj la Jesua respondo. Pro lingva premo oni kondamnis lin al morto; pro lingva premo li akceptis tion. Pro lingva premo la eklezio ne komprenis ĉi tiun „ibnon de la hom(ec)o, ibnon de Dio", nek liajn farojn.

11 Ibni

Multaj diros ke la centra verbo de la kristana religio estas *kredi*. Tamen la vorto kredi ne tre taŭgas. Ĝi ja signifas: opinii ion verdirita aŭ iun verdirinta, verdirema. Nu, tia opiniado ne estas la centra ago de religiano.

Ankaŭ la verboj *fidi* kaj *konfidi* ne indikas la centran agon; la verboj indikas ke oni kredas iun helpema, kapabla, bonvola.

La esenca ago estas *ibni;* „ibni la Sanktan Mentalon" estas „lasi sin gvidi far la Sankta Mentalo"; „ibni Jesuon" signifas „lasi sin karakterizi far la Jesua konduto". „Ibni" estas „serĉi mentalan influiĝon".

Belan komparon Jesuo donis laŭ Johano 15 : 1: Mi estas la vera vinberarbo, kaj mia Patrumo estas la kultivisto. Ĉiun nefruktodonan branĉon en mi Gi forprenas ..... Kiel la branĉo ne povas de si mem doni frukton, se ĝi ne restas en la vinberarbo, tiel ankaŭ vi ne povas, se vi ne restas en mi. Mi estas la vinberarbo; vi estas la branĉoj; kiu restadas en mi, kaj mi en gi, tiu donas multon da fruktoj; ĉar sen mi vi nenion povas fari.

Mallonge dirite: se iu ibnas Jesuon, se Jesuo ibnigas iun, gi havos fruktivan vivon.

Se iu volas kredi, aliu devas malmensogi. Se iu volas fidi, aliu devas esti fidinda. Sed se iu volas ibni mentalon, gi mem devas agi laŭe. La oftajn malagemon kaj malpovon de la kristanaro nepre influis la fakto, ke oni ne havis taŭgan terminon por indiki la centran nocion pri la kristana konduto. Nur per komparoj la biblio kaptis la nocion, sed tio ne sufiĉas por konscia religia vivo.

La kristana tradicio uzas la verbon *kredi* kiel centran verbon. Tio kaŭzis la oftegajn kverelojn pri la dogmaro; pro tio oni neglektadis la mentalon tiome ke la humanismo kaj la socialismo serĉis siajn vojojn ekster la eklezio.

Eklezio, humanismo, socialismo, kiu grupo plej bone ibnas Jesuon? Mi ne donas respondon, sed nur konstatas ke nepre ĉi tiujn kaj aliujn ismojn disigas la lingva premo. Nepre necesas rompi tiun premon pere de maltradicia normlingvo. La plej esenca tasko de helplingvo estas, ke ĝi donu la eblon por interkompreno. Ĉiu unuopa homo estas des pli komprenebla, ju malpli gi mispensas. Do: sentu kaj pensu klare per normlingvo!